

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

Heinrich Heine,  
Die Lorelei

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

*Tiu traduko estas poste  
iom modifita de aliu-  
loj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leo-  
pold Elb.*

Ne scias mi, kial sub-  
ita  
malgaj' en la koro na-  
skiĝis;  
el tempo jam enteri-  
gita  
legendo al mi revi-  
viĝis.

Jam malvarmetiĝas l'  
aero,  
la Rejno mallaŭte ba-  
bilas,  
per oro de l'sun' en  
vespero  
la supro de l' monto  
rebrilas.

Plej belan knabinon  
mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto  
ŝi sidas,  
la harojn mistere  
kombante.

La oran kombilon ŝi  
movas  
kaj kantas tra l' pura  
aero,  
kaj forto mirinda sin  
trovas  
en tiu ĉi kant' de  
l'vespero.

...

Ne scias mi, kial mi  
estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia me-  
mor'.

Vespero jam ekmal-  
heliĝas,  
Fluadas la Rejn' en  
trankvil',  
La supro de l' monto  
lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen  
tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon  
kronas  
Mirinde la ora ha-  
rar'.

Ŝi uzas kombilon el  
oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

...

Ich weiß nicht, was soll es  
bedeuten,  
daß ich so traurig bin;  
ein Märchen aus alten Zei-  
ten,  
das kommt mir nicht aus  
dem Sinn.

Die Luft ist kühl und es  
dunkelt,  
und ruhig fließt der Rhein;  
der Gipfel des Berges fun-  
kelt  
im Abendsonnenschein.

Die schönste Jungfrau sit-  
zet  
dort oben wunderbar,  
ihr goldnes Geschmeide  
blitzet,  
sie kämmt ihr goldenes  
Haar.

Sie kämmt es mit golde-  
nem Kamme,  
und singt ein Lied dabei;  
das hat eine wundersame,  
gewaltige Melodei.

...

Min kaptas malgaj'  
en la koro,  
pro kio tia trist'?'  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun  
persist'.

Aere fridetas, trank-  
vilas,  
malhelas jam la Re-  
jn'.  
La monto surpinte  
brilas  
vespere en rava scen'.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el  
or'.

Ŝi kombas per ora  
kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

...

Ŝipet' iras sur la rivero, ŝipisto ektramis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kantanto.	Kaj sopiregon eksentast Ŝipisto dum sia vetur'; Rifaron li ne prientast, Al monto rigardas li nur.	Den Schiffer im kleinen Schiffe ergreift es mit wildem Weh; er schaut nicht die Felsenriffe, er schaut nur hinauf in die Höh.	Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ekzalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.
--	---	--	---

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvoturnado; ĝin Lorelej' faris kruela, per sia mirinda kantado.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ich glaube, die Wellen verschlingen am Ende Schiffer und Kahn; und das hat mit ihrem Singen die Lorelei getan.	Mi kredas, ke ondoj tiras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.
--	--	---	---

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/kolekto/Lorelej.html>.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17), publikigita 1823.*

Arg-2-2 (2014-04-23 18:09:02)

Aus dem Werk "Buch der Lieder", Kapitel "Die Heimkehr", Abschnitt II. Siehe auch ein <http://gutenberg.spiegel.de> unter: [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1131&kapitel=12&hash=eb14eca2272#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1131&kapitel=12&hash=eb14eca2272#gb_found). Vidu ankaŭ: [http://www.gedichte.vu/?die\\_lorelei.html](http://www.gedichte.vu/?die_lorelei.html). La melodion verkis la komponisto Friedrich Silcher. Vidu la retejon [http://www.lieder-archiv.de/die\\_lorelei-notenblatt\\_300493.html](http://www.lieder-archiv.de/die_lorelei-notenblatt_300493.html).

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)